# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 21/10/2021 Kvincentkvindektria eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*


**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 813,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **226,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **198,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde marto 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**

**Esperanta Retradio**

Malpli da insektoj

18a oktobro 2021



**3zzz** La temoj de la elsendo de la 18a de oktobro estas:



- la ĉeesto de aŭstralia birdo, la kakatuo, en pentraĵoj de la Renesanco
- la retransdono de la pluvarbaro, Daintree, al la aborigenoj
- Mikis Teodorakis
- la pozitiva efiko de la interreto por pensiuloj

Ĝuu la aŭskultadon Informas *Franciska Toubale*


★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"



(de Mason Stuttard). N.ro 57 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La Esperanta verbsistemo do estas perfekta: Krom en la nur ses duverbaj modalaj modoj kun du verboj, en Esperanto ekzistas nur unuvortaj, nur unuverbaj, predikatoj, ĉiu kun unu el la verbaj finaĵoj as,is,os,us, kaj u. Tio validas por ĉiuj tri gramatikaj voĉoj: Aktiva, pasiva, kaj mediala. Ne ekzistas kombinitaj verboj por pli ol unu tempo, nur ekzistas kombinaĵoj de helpverbo kun verba adjektivo nomata participo ("ni restis sidantaj", "ĝi estas trovota"), kaj kelkaj unuvortaj kombinoj de verbo kun verba sufikso ("li ludemas", "tio manĝeblas").

Demando: Se en Esperanto "Mi estas manĝanta" kaj "La futballudo plu estis ludata" nomiĝas "durativa tempo", indikanta ke la ago ankoraŭ ne finiĝis, kiujn vortojn oni uzas en la angla lingvo por tiu gramatika tempo (= tense)? Kaj kiom da verboj la angla uzas por tio? Kaj ĉu en Esperanto ekzistas duvorta prezenco, kiel la perfektotempa "Mi estas manĝinta"?

2). La ses t.n. participoj, kiuj en Esperanto estas verbaj adjektivoj, povas, sed ne bezonas, uzati kune kun tempojn indikantaj helpverboj, por tiel indiki kombinaĵojn de du interrilatantaj agoj en diversaj tempoj, kion faras la etnaj lingvoj per du verboj. La helpverbo indikas la tempon de la unua ago, dum la participa sufikso indikas, AŬ per -ant aŭ –at la nefinitecon de la precipa ago, AŬ la pasintecon rilate al ĝia nuno, AŬ la futuron rilatantan al ĝia nuno. Eblas do sesoble (as,is,os,us,u,i) ses (ant, int, ont, at, it, ot) kies totalo estas 36 kombinaĵoj.

Demandoj: A). Donu pasivan ekzemplon en kiu la angla uzas kvar verbojn.

B). Donu Esperantan ekzemplon de sen helpverbo uzata participo kiu en etnaj lingvoj ne povas dirati en unu vorto.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 553. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* View Email in Browser (enudgemail.com.au)

Ankaŭ *the Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn

*Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



# La Manlia Esperanto-Klubo



## Rekomencas siajn kunvenojn

La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 16a de oktobro estis la tria sabato. Venis Roger, Chris kaj John
Finfine Sidnejanoj estis permisitaj renkontiĝi, viziti, manĝi, butikumi.
Estis longa tempo ekde ni kune sidiĝis ĉe la marbordo.
Same se oni vekiĝis el vintradormo ------ la tuta mondo ŝajnis freŝa kaj buntkolorita. La preterpasintojn plenplenigis feliĉo kaj vigleco.
Ni havis tre ravan matenon babilante kaj babilante.

*Chris*  *Holliss*

# El Adelajdo




La oktobra kluba kunveno de la sudaŭstralianoj estis hibrida, ĉeesta kaj perreta samtempe. La ĉefpreleganto de la vespero, Sandor Horvath, prezentis al ni esperantajn fi-vortojn per Zoom. Helen kaj Celie ankaŭ Zoom-is dum sep adelajdanoj sidis en la kluba ĉambro en Clarence Park.



*Katja Steele*

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro
Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.
Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

*Roger Springer*



Ĉu militaj nukleaj ŝipoj estas sen danĝeraj? Ĉu nukleaj reaktoroj estas sen danĝeraj?
Nun Usona nuklea submarŝipo havis subakvan akcidenton en la Suda Ĉina Maro vundante 11 de sia ŝipanaro. Oni demandis ĉu la kolizio kaŭzas nuklean likon aŭ difektas lokan maran medion ktp ? *The U.S.' nuclear sub accident in the South China Sea is significant - CGTN*



La Suda Ĉina Mara havas fiŝbredejojn en kiuj kreskas fiŝoj por la ĉina popolo. Profundaj kaj pezaj

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). Helpverbo *"to be" plus present participle (ekz. "(He) is singing" + "(He) is being heard").*
Du verbojn.
Ne, en Esp. ne ekzistas ĝi ĉar ĝi ne bezoniĝas, kaj ĉar "(manĝ)anta kaj (manĝ)ata" estas la durativo, en kiu la ago ankoraŭ ne estas finita.



2). A). *"(The letter) will have been sent".*
B). "La manĝota fiŝo", "La manĝata fiŝo", "La manĝonta kokino". *Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# D i o k a j A l l a h .

**KRUELECO.**


Mi deziris ekscii la opinion de miaj diokredantaj geamikoj pri tre kruelaj agoj faritaj en la nomo de Dio, ekzemple al judoj, al islamanoj, kaj al aliaj religianoj. Sed ĉar tiaj kruelaĵoj okazis antaŭ pluraj jarcentoj, mi petis mian islaman amikon informi min pri islama krueleco ankoraŭ nun okazanta en la nomo de Allah.

Pasintan semajnon mi menciis, ke en nia menso okazas pluraj agosentoj kiujn ni ne mem kreas intence sed kiujn kreas nia korpo, ekzemple la neceso feki. Unu tia estas la deziro iel ajn sekse rilati al alia persono. Ni ne mem konscie kreis tiun neceson, sed io en nia korpo kreis ĝin. Ĝi faratis kvazaŭ de Dio. La sento estas tre forta, kaj estas malfacila subpremi kaj malobei ĝin. Sed ofte ni volas malobei la senton, ĉar ĝia obeo kreus gravajn problemojn, ekzemple ni havas edzon aŭ edzinon aŭ gefilojn, aŭ la direktata persono ne amas nin aŭ ne deziras la rilaton. Sed tre malfacila ofte la problemo estas.

La socio, aŭ la religio, volas puni nin se ni obeas niajn sentojn, en certaj kazoj. Tiel la islamanoj en kelkaj landoj per ŝtonado mortigas virinon kiu obeis sian amosenton. Cetere tian viron oni ne punas. Ŝajnas al mi, ke la viroj ĝuas rigardi tian ŝtonadospektaklon. Mi demandis al mia amiko, ĉu Allah deziras ke ni punas tiom kruele, dum la krimo estis malfacila nefari. Li respondis, ke la puno devas esti tiom kruela, por timige persvadi aliajn ne krimumi. Mi demandis ĉu oni scias, kial Allah kreis la fatalan senton ĉe virinoj. Li respondis, ke tiel li testas sian kreaĵon. Post tio mi demandis, ĉu Allah kreis la tutan mondon kaj estas ĝia mastro. Li respondis ke jes, sed li ne respondis al mi kiam mi demandis, ĉu Allah ne povis krei la homojn kun karakteroj ke ili ne krimu. Ĉu iu islamano aŭ kristano povas klarigi la aferon al mi?

**ALIA DEMANDO:**

Ĉu la registaro aŭ Dio povas aŭ volas puni tiujn viktoriajn homojn kiuj ne obeis la virusoregulojn kaj tiel ne malhelpis la multajn nunajn mortojn pro la viruso? *Marcel Leereveld.*




Kishida triggers backlash by saying dumping Fukushima nuclear water can't be delayed - Global Times